

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTO-
RÖRELSEN I SVERIGE

UTGIVEN AV GEFLE
ESPERANTOFÖRENING

N:o 9.
Oktober 1913.

Redaktör:
R. PEHRSSON

Ansvarig utgivare:
W. WAHLUND

Lösnummer 10 öre.
Årsprenumeration 1:20 kr.
Annonspis 5 öre pr mm.

Kelkaj vortoj pri la instruado de Esperanto.

Oni povas instrui nian lingvon diversmaniere. Estas vere. La metodoj *devas* ankaŭ esti diferencaj, sin aplikante al la publiko, al kiu oni instruas. Sed tamen unu metodo povas superi la alian kaj doni pli bonajn rezultatojn. Inter la multaj sistemoj, kiujn mi uzis, neniu tute plaĉis al mi. Ĉiu havas sian valoron, sian bonan econ, kvankam la metodo ankaŭ montras mankojn. Uzante multajn metodojn kaj instruajn sistemojn, oni ankaŭ multe lernas, vidas la mankojn, la super-econ. Ĉerpante el miaj spertoj, mi volas doni kelkajn konsilojn, kiuj certe povas esti bonaj por tiuj samideanoj, kiuj sin okupas pri la instruado de nia kara lingvo Esperanto. Do unue, instruu ĉiam Esperanton *per* Esperanto! Komencu tuj *en* Esperanto kaj lasu al la elevoj de la unua momento paroli *en* la lingvo! Ĉio ja estas tiel mistere en la komenco. Sed baldaŭ la elevoj paroletas, parolas flue. De la unua momento ankaŭ lasu al ili ripeti la frazojn *kune!* Diru fraزون klare kaj malrapide, lasu unu el la lernantoj rediri ĝin, kaj tuj poste, ĉiuj *samtempe* ripetu la samon. La ĥora parolado estas tre, tre utila kaj donas bonajn rezultatojn. La elevoj ankaŭ ne timas paroli Esperanton post tia instruomaniero, kio alie ofte bedaŭrinde okazas.

Uzu kiel eble plej multe *bildojn, ilustraĵojn* en via instruado! Memoru, ke io *»vidita»* preskaŭ ĉiam estas memorata! Esperanto ja estas tre facila lingvo. Sed tamen ni ne

forgesu, ke nia lingvo havas sian *spiriton*, preskaŭ romanan, kaj ke la lingvo, spite de la faciliga vortfarado, enhavas multe da radikaj vortoj, kiujn oni *devas* enlerni. Estas tial necese doni al la lernantoj *apogojn* por la memoro kaj *rimedojn* por iom rapide kompreni la spiriton de nia lingvo. Por ni svedoj multe da vortoj en Esperanto ŝajnas esti, je la unua vido, iom strangaj pro sia romana deveno, kaj iom nekonataj, fremdaj. Por komencanto la lernado de Esperanto ŝajnas esti malfacila. Terura laboro por lerni tiun misteran, romanan lingvon, oni pensas. Vero ankaŭ estas, ke la vortoj *ovo, frato, trans, ponto, porti* k. t. p. estas por persono, kiu ne studis alian lingvon, malfacile akireblaj por la memoro. Do estas la devo de la instruanto montri samspecan, eble saman vorton en nia propra patra lingvo, kaj tiamaniere helpi la lernanton kaj doni apogon por la memoro. Ekzemple: La vorto *»ovo»* (svede=*ägg*) estas malfacile lernebla por komencanto, kaj li ne povas imagi, ke la vorto svede signifas *»ägg»*. Sed ni havas en nia lingvo tre konatan kaj ordinaran vorton *oval* (*äggformig*). Aha! Nun oni vidas la rilaton! *Nun* ne estas malfacile kompreni la signifon de la vorto *»ovo»*! Oni ankaŭ ne povas forgesi la vorton *»ovo»*, (= *ägg*) ĉar oni ja *scias* la vorton *»oval»* (= *äggformig*). Same la vorto *»frato»* havas rilaton kun sufiĉe konata vorto *»fraternisera»* (*förbrödra*). Do la lernanto rapide povas lerni kaj facile memori, ke la vorto *»frato»* signifas svede *»broder»*. Plue ni uzas en nia patra lingvo ofte la vorton *»transport»* kaj *»transportera»*. La instruanto de Esperanto simple montras, ke la vorto estas kunmetita de *»trans»* kaj *»port»*,

kaj ke la laŭvorta traduko de la fremda vorto *»transportera»* estas = *»pá andra sidan bära»* (*överföra*), samtempe klarigante al la lernantoj, ke la vorto *trans* en Esperanto ĉiam signifas *»pá andra sidan»* kaj *port(i)* = *»bära»*. Post tia instruado de la vortoj esperantaj la lernantoj facile ilin lernas kaj — memoras. La vorto *ponto* havas rilaton kun la svede uzata esprimo *»pontombrygga»* (*brobrygga*) pontoniärer (som slå broar) k. t. p. Estas sama afero en la lingvo kiel en la matematiko. Oni devas serĉi kaj solvi la X-on, la nekonatajn, per la konataj! Oni devas instrui Esperanton prudente kaj metode, kaj oni vidus, kiel facile la lingvo estas lernebla. Laŭ mia opinio la instruanto de Esperanto devas ŝpari la instruon de la gramatikaj detalajoj ĝis kiam la elevoj iom posedas la lingvon. La ĉefan parton de la gramatiko la instruanto tamen lernigu en la patra lingvo. Sed li nature faru la aplikon de la lernita gramatiko *en Esperanto*. Memkompreneble estas utile, se la instruanto kaj la elevoj konas aliajn lingvojn, fari komparojn k. t. p. Por komprenigi la *spiriton* de nia lingvo Esperanto la instruanto montras la konstruadon de la esperantaj frazoj, la diferencon en ilia konstruo rilate al nia sveda lingvo. Li kutimigu la orelojn de la lernantoj je la sono de la vortoj en ordinara esperanta interparolo, je la akcento, intersekvo de la sonfaskoj k. t. p. Por vidi, kiom la lernantoj progresis en la lingvo, estas utile rakonti anekdoton, kaj poste lasi al ili rerakonti la enhavon. La instruanto tuj rimarkas, ĉu la verboj, substantivoj aŭ io alia ofte mankas al ili. Mi spertis, ke ofte *verboj* mankas. La instruanto devas atenti pri tio kaj doni ilin dum la

sama leciono. Por instrui la sufiksojn *an*, *et* k. a. oni atentigu pri la vortoj kiel Amerika—amerikanare, vegetarism—vegetarian (anhängare av vegetarismen), lans—lancett (en mindre lans) k. t. p.

*

La instruado estas tre riĉa, interesa pedagogia problemo. Mi ankaŭ ne pretendis per tiu ĉi malgranda artikolo tute pritrakti la gravan kaj vastan demandon. Mi nur volis doni kelkajn vortojn pri tiu temo. Ĉiu metodo, ĉiu lerna sistemo tamen restas preskaŭ senfrukta en rezultato, se la instruanto ne per sia propra instrumaniere enblovas en ĝin vivon kaj energion. La instruanto devas esti la forto, la nelacigebla instiganto. Li devas ĉiamaniere uzi la pedagogiajn helpilojn. La instruanto devas antaŭ ĉio ankaŭ instigi kaj fortigi la *memagecon* de la lernanto, zorgi por ke la lernanto *mem* komencas pensi kaj labori en Esperanto. Pli aŭ malpli frue ĉiu vera pedagogo ankaŭ spertos kaj vidos la valoran veron en la vortoj de Sokrates:

»Multe mi lernis, de miaj lernantoj plej multe.»

Teodor Rosengren.



Kurs

i Esperanto för nybörjare.

Sjätte lektionen. — Sesa leciono.

Översättning av övningsstycke IV.

Din (Eder) far och min mor äro syskon. Hans föräldrar äro mycket trevliga åldringar (»gamlingar»; ang. efterstavelsen *-ul'* se nedan!) Du bör besöka deras hem, när du kommer till vår stad.

Makarne ha tre barn, én son och två döttrar. Sonen är yngst, hans namn är Karl. Hans äldsta syster är Maria; hon är 20 år gammal (eg. 20-årig). Hans yngre syster är 18 år; hennes namn är Elisabet. Karl själv föddes (är född) den 23 oktober år 1898; han är således nu 15 år gammal.

Det är nödvändigt, att man lär sig akusativformen noggrannt. Icke blott substantivet och adjektivet kunna ha n-form utan även prono-

men. T. ex.: Jag älskar dig. Man bör hedra sina föräldrar.

Anmärkingar.

Lia nomo estas kan även översättas med *han heter*. På samma sätt: Min bror heter Robert, *la nomo de mia frato estas Roberto*.

Estas necese. Det översättes icke, då det är obetonat och ej syftar tillbaka på något som förut nämnts. T. ex. *pluvas*, det regnar, *estas bela vetero*, det är vackert väder. Syftar det tillbaka på ett förut nämnt föremål översättes det däremot med *ĝi*; står det i st. för en hel sats, översättes det med *tio* (detta). T. ex. Bordet är litet, och det är ej vackert: *la tablo estas malgranda, kaj ĝi ne estas bela*. Bordet är litet, men det (detta) betyder ingenting: *la tablo estas malgranda, sed tio signifas nenion*.

Lernu. Uppmaningsformen, som ändas på *-u*, användes ofta efter ord sådana som *hoppas, önska, det är nödvändigt* o. s. v. för att uttrycka en önskan eller ett slags indirekt uppmaning. T. ex. *Mi esperas, ke li venu, jag hoppas, att han måtte komma*.

Ekzemple. S. k. adverbial, som angiva tid, rum, sätt eller orsak, bestå i svenskan ofta av två eller flera ord, men kunna i Esperanto vanligen sammandragas till ett ord, som då får adverbändelsen *-e*, t. ex. på (el. om) aftonen: *vespere* (en la vespero), på vägen, *survoje* (sur la vojo), på så sätt, *tia-maniere* (en tia maniere).

Verb.

Verben kunna även få form av adjektiv, t. ex. en *älskande* make, en *älskad* moder. Esperanto har för vardera av dessa former tre ändelser, angivande förfluten, nuvarande och tillkommande tid. Av *am'i*, älska, erhålles:

am'ant'a, älskande, som älskar,
am'int'a, havande älskat, som har älskat,
am'ont'a, skolande älska, som skall älska.

am'at'a, älskad, som älskas,
am'it'a, som har älskats,
am'ot'a, som skall älskas.

Dessa former böjas alldeles som adjektiv. De kunna emellertid även få substantiv- och adverbändelser. Såsom substantiv beteckna de vanligen personer. T. ex. *am'ant'o*, älskare, *leg'ant'o*, läsare, *kon'at'o*,

(*kon'i*, känna), en känd el. bekant; *vid'int'e vian anoncon*, havande sett Eder annons = som (emedan) jag har sett Eder annons . . .

Ändelsen *-at'a* (*-it'a*, *-ot'a*) användes jämte hjälpverbet *esti* för att den passiva formen av verben, som i svenskan vanligen bildas genom ändelsen *-s*, t. ex. älskas, ses, tros. Även i svenskan kan den bildas på liknande sätt medelst hjälpverben vara och bliva, t. ex. att älskas = att vara älskad = *esti am'at'a*; att ses = att bliva el. vara sedd = *esti vid'at'a*. Således:

Mi estas am'at'a, jag är älskad, jag älskas,
mi estis am'at'a, jag var älskad, jag älskades,
mi estos am'at'a, jag skall vara el. bliva älskad, jag skall älskas.

Ordbildning.

Efterstavelsen *-ul'* betecknar en person, utmärkt av de egenskaper stamordet anger, t. ex. blind'a, blind, blind'ul'o, (en) blind; jun'a, ung, jun'ul'o, yngling; bel'a, vacker, skön, bel'ul'in'o, skönhet (en skön kvinna).

-ist' betecknar en person med det och det yrket; t. ex. mašin'o, maskin, mašin'ist'o, maskinist; bak'i, baka, bak'ist'o, bagare; labor'i, arbeta, labor'ist'o, arbetare.

Övningsstycke V.

Anekdot.

Viro estas kurinta preter Sokrato dum unu el la promenadoj de la filozofa. Alia viro, kiu postkuris lin, kriante: arestu! arestu! haltis ĉe Sokrato kaj riproĉis:

»Kial vi ne malhelpis lian forkuron? Li estas krimulo, mortigisto!»

»Mortigisto? Kion vi komprenas per tiu vorto?»

»Ne ŝercu! Mortigisto estas homo, kiu mortigas.»

»Buĉisto?»

»Malspritulo!» »Homo, kiu mortigas alian homon.»

»Ha, jes, soldato.»

»Azeno!» »Homo mortiganta alian ekster milito.»

»Mi komprenas: ekzekutisto.»

»Idioto! Homo, kiu mortigas alian hejme.»

»Tre bone, kuracisto.»

»La postkurinto foriris en la konvinko, ke li estis parolinta kun maljuna frenezulo.»

Ordlista.

vir'o, man.
 kur'i, springa.
 post-kur'i, springa efter, förfölja.
 for-kur'i, springa bort, fly.
 preter, förbi.
 Sokrat'o, Sokrates.
 dum, under.
 promenad'o, promenad.
 filozof'o, filosof.
 ali'a, annan.
 kiu, som, vilken.
 kri'i, skrika, ropa.
 arest'i, arrestera, gripa.
 halt'i, stanna.
 ĉe, hos.
 riproĉ'i, banna, förebrå.
 kial, varför.
 help'i, hjälpa.
 krim'o, brott.
 mort'i, dö.
 mort-ig-i, döda, mörda.
 kio, vad.
 kompren'i, förstå
 per, genom, med.
 vort'o, ord.
 ŝerc'i, skämta.
 hom'o, människa.
 buĉ'i, slakta.
 sprit'a, kvick, vitsig.
 azen'o, åsna.
 ekster, utanför.
 milit'o, krig.
 ekzekut'i, avrätta.
 kurac'i, bota, läka.
 cert'a, säker, viss.
 konvink'o, övertygelse.
 parol'i, tala.
 kun, med.
 frenez'a, tokig, vansinnig.



Hur jag blev esperantist.

Dr Enrik Fischer berättar här om:

— När jag år 1903 påbörjade en resa genom Östern, fann jag i en serveringsvagn mellan Bukarest och Konstantz en herre, vilken fåfängt försökte förklara något för kyparen. Denne försökte med alla språk och talade rumänska, serbiska, turkiska, bulgariska och ryska. Fåfängt! Främlingen förstod icke. Jag, färdig att hjälpa till, närmade mig — jag talade utom rumänska sex andra språk — och jag frågade på tyska, franska, engelska, italienska, spanska och grekiska, på vilket sätt jag trodde mig kunna hjäl-

pa. Allt fåfängt. Främlingen förstod icke ett enda av dessa språk. Då påminde jag mig en artikel i en tidning om Esperanto, vilken jag tvivlande läst för någon tid sedan och jag frågade: »Cu vi parolas Esperanto?» Ett utrop av glädje! »Jes, mi parolas». Och han fortsatte på Esperanto, vilket jag nu icke förstod, ty med denna enda fras var min kunskap i Esp. begränsad. Knappt hade främlingen märkt detta, förrän han genast visste råd.

Han lämnade mig en liten bok på engelska språket, en s. k. esperantonnyckel, vilken finnes på nästan alla språk. Mycket små häften, vilka fastän de endast väga fem gram, dock innehålla hela grammatiken och en ordförteckning, och nu började studerandet. När vi efter tio timmar åter träffades på fördäcket av ett fartyg, kunde jag redan nog mycket för att förstå Esperanto, och jag fick veta, att min medresande, en svensk, även förstod fyra språk, nämligen svenska, norska, danska och finska. Främlingen, kyparen och jag kunde tillsammans tala sexton språk, ändock kunde vi icke förstå varandra. Från den dagen blev jag en entusiastisk esperantist.

Översatt av E. Adamsson.



Just så brukar det vara!

Den internationella föreningen för arbetslöshetens bekämpande höll kongress i Gent den 4—6 sept. Svenska regeringen var representerad, varjämte representanter funnos för svenska landsorganisationen, för arbetsgivareföreningen och för Stockholms stad.

Kongressen lär inte ha infriat några högre ställda förväntningar. En av de svenska deltagarna har härom meddelat bland annat följande:

»På det hela måste sägas, och det var nog en allmän uppfattning på mötet, att utbytet av kongressen blev skäligen ringa — — — Förhandlingarna drog också ut därigenom, att varje anförande, som hölls på ett av de tre tillättna språken, franska, tyska eller engelska, sedermera omedelbart tolkades å de båda andra språken. Mot tolk-

ningarnas riktighet kunde ofta befogade anmärkningar framställas, och dessutom kommer det lätt en känsla av uttråkning över dem, som skola höra ett och samma föredrag tre gånger å rad på skilda språk.»

* * *

Jojomen, just så brukar det gå till! Det är till och med ännu värre. Vid ovannämnda kongress synes man haft endast tre tillättna språk, och således ignorerat kongressplatsens nationella språk, flamländskan. Annars brukar man av hövlighetsskäl tillåta användning även av kongresslandets eget språk, i fall att detta är något annat än franska, tyska eller engelska. Dessutom har Esperanto åtskilliga gånger varit tillåtit vid internationella kongresser, av hänsyn till att deltagare kunnat finnas, som ej behärskat något av de tre eller fyra övriga tillättna språken. (Det är nämligen ett misstag att tro, att ryssarna i allmänhet kunna flytande tala ett eller flera främmande språk, eller att något synnerligen stort resultat åstadkommes för den lilla förmögenhet, som svenska staten årligen betalar för att befrämja och befästa engelskans och tyskans företräde vid den svenska nationens samfärdsel med främmande folk.) Således kunna ända till fem olika språk på fullt giltiga skäl vara tillättna vid en enda kongress.

Alla deltagare i en sådan mångspråkig kongress befinna sig för övrigt ej i samma lyckliga läge, som den här ovan citerade, nämligen att kunna uppfatta allt som säges under förhandlingarna. I regeln är det till och med så, att de personer, som ej tillhöra någon av de privilegierade nationerna (t. ex. svenskar vid en kongress utom Sverige), måste åtnöja sig med att veta i närmaste ingenting till dess beslut redan fattats i de omdebatterade frågorna.

Det kan ifrågasättas, om det ej skulle vara i alla vederbörandes intresse, att uppdraga åt några betrodda personer att med ringa möda inhämta kunskap i Esperanto och därefter närvara vid esperantokongressen i Paris 1914 för att söka utröna, huruvida det mellanfolkliga hjälpspråkets användande som enda tillättna språk vid kongressförhandlingar kunde medföra som resultat, att man på en dag medhunnit lika mycket, som under hittillsvarande förhållanden ej medhunnits på tre eller fyra dagar.

Rigardanto.

Jorden runt.

Finland. — Bland de kurser som f. n. pågå i Helsingfors märkes även en kurs för blinda under ledning av herr Yrjö Nummi.

Frankrike. — Staden Sotteville-lès-Rouens styresmän ha beslutat giva en av stadens gator namnet Zamenhof. Namnskylden skall högtidligen uppsättas under normandiska Esperantoförbundets 7:e kongress år 1914.

Japan. — Yokoska Esperantoförening har för någon tid sedan hållit stora propagandamöten dels i Yokoska och dels i Kamakra, en liten stad i närheten av Yokoska. Vid mötena medverkade bland andra d:r Nakamura, föreståndare för Meteorologiska Centralobservatoriet, och d:r Kroita, professor i litteratur vid kejserliga universitetet i Tokio. Den livskraftiga föreningen kommer även snart att utge en esperanttsk resehandbok över Yokoska med omgivningar.

Kina. — Ministern för undervisning, konst och vetenskap, Tsai-Guennbeh, har till den framstående franske esperantisten general Sebert skrivit: »Hädanefters skall jag göra mitt bästa för att utbreda det internationella hjälpspråket i alla delar av republiken. För att visa att jag är en »samideano» kan jag meddela, att jag just nu anordnar en Esperantokurs i huvudstaden».

Schweiz. — I samband med nionde Esperantokongressen hölls i Bern den 31 aug. ett sammanträde av förkämpar för kvinnorösträtten, besökt av 38 deltagare från 9 olika länder. En kommitté tillsattes för anordnande av sammanträden och föredrag i ämnet under nästa världskonferens i Paris.

Spanien. — Den 1 okt. påbörjades den officiella Esperantokursen vid universitetet i Barcelona. Tidigare har en avgiftsfri kurs tagit sin början vid läroverket därstädes.

Tyskland. — Åttonde tyska Esperantokongressen har nyligen ägt rum i Stuttgart, besökt av över 200 deltagare, däribland åtskilliga utlänningar. Anmärkningsvärt är, att de vidlyftiga förhandlingarna nästan uteslutande fördes på Esperanto. — Nästa års kongress hålles i Leipzig, vartill inbjudan inkommit från

magistraten därstädes. — På den bokindustri-utställning, som nästkommande år hålles i Leipzig, kommer man att på »nationernas gata» även uppsätta en Esperantopaviljong.

Ungern. — Vid den i Budapest avhållna internationella kongressen för kvinnorösträtten, hälsade d:r Giesswein deltagarna på tyska, franska, engelska och Esperanto.



Mia libertempa agado.

Dum mia libertempo en la somero de la jaro mi vizitis la naturbelan Dalekarlion ĉe la gastejo de Smedby, bele kuŝanta apud »Dalälven». La estado ĉe la gastamaj gesinjoroj Malmström estis agrabla. Du fojojn en ĉiu tago bano en la rivero, multaj afablaj invitoj al la loĝantoj, kiel al popolinstruisto, al Storis, Rörshyttan k. t. p. Kelkaj samideanoj troviĝis je la sama loko. Mi vizitis ilin por vekti al vivo la komunan celadon. La rezultato estis 37 abonoj je »La Espero» kaj krom tio ili promesis lerni nian lingvon. Ili ankaŭ admonis min fari esperantan paroladon, sed mi nur promesis doni al ili kelkajn ekzemplojn kaj ekzercojn en la gramatiko. En la granda salono de la popollernejo mi donis kelkajn klarigojn pri la esperanta movado k. t. p. al interesataj aŭskultantoj. Al mia demando, ĉu ne en tiu loko, kun siaj malnovaj memoroj de la tempo de Engelbrekt kaj la Sture'oj, estus konvene fondi klubon esperantistan, la partoprenantoj tamen ne donis respondon, nek jesan nek nean.

Ankaŭ mi faris kelkajn provojn okupigi gvidanton por la afero, sed kvankam sin trovis tie multaj taŭgaj kapabluloj, kiel s-roj Engström, Hagermark, Montan, Bergstrand kaj fraŭlino Torsell kaj poŝtejestro Olsson, neniu volis kunhelpi aranĝi tiun aferon. Eble en la proksima estonteco ankaŭ vi miaj amikoj vekiĝas kaj »en laboro paca ne laciĝos, ĝis la bela sono de l' homaro por eterna ben' efektiviĝos».

H—.



Bär Esperantostjärnan!

Du poeziaĵoj de Viktor Rydberg.

Libere tradukitaj de Leander Tell.

Floro.

Ĝi kreskis sur tomo ĉe krucpied',
Solega flor',
Kaj venis vivforto al ĝi pro ced'
De halta kor'.

Ĝi larmakvumita balancis kun ĉarm'
Je nokta kaj karesa vent'.
Ke ĝia purpuro dependis de varm'
De vang' knabina estis sent'.

Okula enigm' de la junulin'
Kun halta kor'
Klarigiĝis. — Junulo komprenis sin
Pro la odor'.

En la nokto.

Ho, la lago, kiu kisis dormiĝantan
rozon de la bordo.
Estas nun silenta kaj la arbareto.
Dolĉe lumis sur la templetomonteto
La vesperbrilo, ĝi paliĝis jam kviete
revadanta kaj trankvila.

El la maro iras nun silentaj steloj,
kaj silentaj staras
Nun la palmokronoj. — Ĉie la silento
Post ke en la mirtarbaro ĵus la vento
Dolĉe ekĝemetis kaj mortiĝis en
trankvilo
revadanta kaj trankvila.

Laca ondo malleviĝis sur kuŝejon de
la mola musko
Apud sia urnorando, dormiĝanta
Je la bruo de la fonto flueganta.
Jen, la brusto levigadas en la lunolumo.
revadanta kaj trankvila.

Dum ĝi vidas en revado ĉarma nun
la mondon kristalpuran
De la nigra veo, kaj rigidiginta
Estas nun la tempoŭo. Dormiĝinta
Sur la brako de la Ĉiopatro ĝi do
estas
revadanta kaj trankvila.

Esperanto-världskon- gressen i Bern.

Det inträffade under kongressen en episod, som verkligen bör räddas undan glömskan. Det var det märkliga telegrammet från herr *Eduard Wenk*, f. d. ordförande för det schweiziska Idoförbundet. Han hälsade Kongressen och beklagade att han blivit idist, »ty Esperanto-rörelsen ledes mycket mera förnuftigt och går mycket mera framåt». Och herr *Wenk* fortsätter: »Jag har blivit övertygad därom, att *Idos framgångar äro lika med — noll*. Framgångarna i Basel nu efter 5 år äro *mindre* än förut. De många och ständiga ändringarna i språket hindra alldeles propagandan. Esperantisterna handla även mycket mera diplomatiskt än idisterna. Inom ido-rörelsen är huvudsaken — personliga meningar.»

I sanning en ärlig bekännelse!

Det är beska sanningen, som hr *Wenk* här kommer med. Men väl bekommet! Det är väl också att hoppas, att utomstående nu skola komma till en verklig insikt om idorörelsen, en den mest osmakliga och vidriga bluffrörelse i vår tid. Även är det väl nu att hoppas, att personer — eljest det internationella språket bevägna, men som stått »avvaktande», mycket tack vare ett hänsynslöst bluffande icke minst i vårt land av allas vår *P. Ahlberg & konsorter* — nu skola ingå i Esperantorörelsen och göra sin insats för det enda och verkliga världsspråket — *Esperanto*.

Teka.



Esperantajo.

Ĉiu, kiu ne volas forfuŝi la help-lingvon, certe konsentas, ke la amplekso de la ĝenerala vortprovizo devas esti tenata inter limoj tre malvastaj. Kaj la sperto evidentigas, ke nia lingvo tamen funkcias bonege. Ju malpli ampleksa la ĝenerala vortprovizo estas, des pli facile la lingvo estas lernebla, kaj des pli bone la lingvo taŭgas por la bezonoj de la pligranda publiko.

Sed por ebligi tian limigon pri

la vortprovizo, estas necese, ke oni iom cedu pri la logiko de multe da vortoj, kaj tiun ĉi ŝajnan malbonon oni devas anstataŭi per pli logika konstruado de la frazoj. Jes! Logiko en kiu ajn lingvo apartenas preskaŭ nur al ĝia sintakso, malpli al la vortaro, kaj malmulte al la gramatiko.

Pli facile oni lernas unu vorton ol du vortojn. Kaj tre facile oni memoras interkonsentitan signifon de kunmetita vorto, eĉ se tiu signifo ne estas precize retrovebla per analizo de la eroj.

La plej laŭorda aro da arboj, kiun oni povas trovi, estas ja *aleo*, sed oni ĉiam komprenas la vorton *arbaro* kiel esprimon por alia difinebla tuto da arboj. Aro da arboj do ne estas nepre *arbaro*. Se oni ne kontentigas je tio, oni devus elekti novan vorton, ekzemple *silvo*, kaj tiamaniere malfaciligi la lingvon. Kunmetita vorto estas ja pli facile lernebla, kaj ankoraŭ pli facile memorebla ol tute memstara vorto.

— Por aliaj aroj da arboj oni havas specialajn vortojn — *aleo*, *ĝardeno*, *parko* — kaj plue oni povas diri *arbgrupo*, k. t. p. — Oni ĉiam komprenas la afikson *-aro* kiel signon por montri difineblan tuton konsistantan el la *-ajoj* aŭ *-uloj* montritaj per la difinanta radikvorto. — Kiu ajn teksto estas ja aro da vortoj, sed, kvankam la vorto *leksikono* certe apartenas al Esperanto, la esperantistoj prefere uzas la vorton *vortaro*, kaj neniu malkomprenas ĝin. — Je kelkaj okazoj tamen nur unu sola senco estas trovebla per analizo. *Ŝtuparo* — ekzemple — estas ja la sola difinebla tuto da ŝtupoj.

La celo de la helplingvo estas ja, ke ĝi servu por la internacia komunikado de la granda publiko. Du kondiĉoj estas necesaj por tio: simpleco kaj unuformeco. Sed logikeco estas bezonata nur kiam ĝi akcelas la simplecon. Oni klopodu skribi kaj paroli Esperanton ĝuste tiel, ke aliaj personoj kiel eble plej precize kaj ĝuste komprenu tion, kion oni volas komuniki al ili. — Se tiu nepra bezono ne ekzistus, oni certe povus ŝanĝi la lingvon kiom ajn laŭ sia persona gusto — kaj neniu plendus.

Rigardanto.



El Havamal.

Saĝa kaj silenta
la reĝido estu,
kaj staru en batalo kuraĝe;
Ĝoje kaj gaje
la viro vivu
dum li atendas la morton.

Sensaĝa vir'
esperas ne morti
se li sukcesas eviti batalojn,
sed la granda aĝo
ne donas feliĉon,
kvankam ponardegoj lin ŝparis.

Mortos via brutar',
mortos amikoj viaj,
kaj mortos ankaŭ vi mem;
sed ion mi scias,
kio mortos neniam:
la juĝo pri ĉiu mortinto.



Carlo Bourlet.

Tra la esperantista mondo flugis antaŭ kelka tempo la neatendita sciigo pri la morto de Carlo Bourlet. Kvankam lia ĉefa agadejo estis Francujo, lia preskaŭ superhoma laboro en la servo de Esperanto influis la esperantistan movadon en plej malproksimaj landoj kaj ankaŭ inter la sveda esperantistaro lia nomo estas konata kaj honorata. El »Oficiala Gazeto» ni ĉerpas la suban priskribon pri lia vivo, kiel homo kaj kiel esperantisto.

*

— Oni apenaŭ bezonas memorigi, ke s-ro Bourlet okupis, inter la Esperantistaro, unu el la ĉefaj lokoj, per la multaj kaj gravaj oficoj, kiujn li plenumadis. Li estis vic-prezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, membro de la Lingva Komitato, direktoro de la Revuo, prezidanto de la Grupo Esperantista de Paris. Lia morto estas unu el la plej gravaj perdoj, kiujn povus suferi la Esperantista movado.

S-ro Carlo Bourlet naskiĝis en Strassburg, la 25-an de aprilo 1866, faris siajn klasikajn studadojn en sia naskurbo, kaj poste en Bourges

kaj Paris (liceo Saint-Louis). Li estis poste akceptita kun la numero 1 en la *École Polytechnique*, kaj kun la numero 2 en la *École Normale supérieure*. Li elektis tiun lastan (1885).

Akirinte kun la numero 1 la diplomojn de »licenciatu por matematikaj kaj fizikaj sciencoj» (1887) kaj »agregaciulo de matematikoj» (1888), li ricevis, tri jarojn poste, la titolon de doktoro de sciencoj.

Li instruis en la *École normale supérieure* (1888), en liceo Lakanal, (1891), en liceo Henri IV (1892), en liceo Saint-Louis (1897), en la Sorbonne (1899). Li faris, de post 1896, la kurson de grafika statiko kaj rezisteco de materialoj en la Nacia Lernejo de Belartoj, kaj estis de post 1906 profesoro de mekaniko en la Konservatorio de Artoj kaj Metioj.

Fama kaj klera matematikisto, s-ro Carlo Bourlet ĉiam laboris por pliproksimigi kun la praktika vivo la pursciencan kaj la sciencan instruadon, por tiamaniere igi la sciencajn studadojn vere utilaj. Krom kompletaj kursoj de Aritmetiko Algebro kaj Geometrio, uzataj en preskaŭ ĉiuj kolegioj kaj liceoj de Francujo (kaj kies hispanaj tradukoj komencas disvastiĝi en Hispanujo kaj Sud-Ameriko), s-ro Bourlet verkis pli ol dudek verkojn de puraj aŭ aplikataj matematikoj, kaj kunlaboris en multaj sciencaj gazeto. Li estis membro de la Ekzamenistaro por agregacio de Matematikaj Sciencoj kaj estis membro de la Naŭa Komisiono pri Metrologio.

Varbita al la lingvo Esperanto en la jaro 1900 de profesoro Charles Meray, s-ro Carlo Bourlet estis unu el la ĉefaj plej agemaj propagandistoj kaj energiaj defendantoj de nia lingvo. De la jaro 1901, li estis elektita prezidanto de la Esperantista Grupo de Paris, kaj de tiu tempo ĉiam reelektita. Li fondigis en tuta Francujo, multajn grupojn, per propagandaj paroladoj, kaj gazetaj artikoloj. Li sukcesis interesigi al Esperanto la gravan francan societaton Touring-Club kaj la plej gravan eldonejon de Francujo, kiu publikigis propagandan gramatikon, verkitan de li, kaj populare konatan sub nomo »ruĝa broŝuro», el kiu ĝis nun, pli ol 500,000 ekzempleroj estas disdonitaj.

Li fondis la *Revuon*, kaj ĝin direktis, helpis la fondon de la »*Scienca Revuo*», kaj poste de la »*Scienca Gazeto*», kaj estis sekretario de la Internacia Scienca Asocio

Esperantista. En la »*Revuo*» kaj aliaj esperantistaj gazetoj, li publikigis multajn propagandajn artikolojn, tradukojn kaj originalaĵojn.

Li ĉeestis ĉiujn Universalajn Kongresojn krom tiu de Washington, estis elektita vic-prezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongresoj kaj de la Administra Komitato de la Centra Oficejo kaj iniciatis la ideon de la deka Kongreso Universalaj en Paris, por kies sukceso li jam estis tre ageme laborinta.

En la memoro de la esperantistoj vivos eterne la nomo de s-ro Carlo Bourlet, kiu dum dektri jaroj dediĉis al nia movado plej grandan parton el sia granda laboremo kaj altaj kapabloj.

»*Ofic. Gazeto*», N:o 58.



Pristagaren.

Översättning från Esperanto.

Hon stod i dörren till den lilla stugan och blickade ned i dalen, i väntan på sonens hemkomst. Ett leende lyste för ett ögonblick upp hennes sorgsna ansikte, då hon tänkte på att han snart skulle komma. Men leendet försvann hastigt och det bleka ansiktet blev åter sorgset och dystert, det var ansiktet av en kvinna, som lidit, som känt ett sårat hjärtas kval och som till den bittra dräggen druckit ur livets glas.

Hon vände sig om och gick in i stugan. Rummet hon steg in i var snyggt men litet och torvtigt. Fattigdomens spår visade sig överallt: mattan på golvet var trasig; taket var svart och kalt; väggarna voro fläckiga och söndriga; möblerna voro gamla.

Plötsligt hördes på avstånd en munter vissling.

— Han kommer! Han kommer! viskade hon.

Och hennes öron nåddes av det älskade ropet: *A-laj-i-o! A-laj-i-o! A-laj-i-o!*

Det var sonens hälsningsrop.

Anyo syntes ett leende på den väntandes läppar; åter glänste hennes ögon, och hon lämnade sin plats vid dörren och gick sakta längs stigen till slutet på den lilla trädgård, som omgav stugan.

— Mamma! hördes någon med ljudlig och munter stämma ropa, och en yngling sprang fram ur bus-

karna på toppen av den närbelägna höjden och närmade sig henne med långa, raska steg. — Mamma! — Och hans starka armar lades om moderns hals och han kysste henne varmt.

Han var 18 år, reslig och vacker, bred över axlarna och med ett kraftigt bröst, ett välformat huvud och ett hår svart som ebenholts, ögon, som ständigt spelade och läppar, som oavbrutet logo.

Hans kläder voro av enkelt kläde, fula och nötta; på ryggen hängde en korg; hans händer och ansikte voro svarta av koldammet, som täckte dem.

— Vänta litet då, Robert! skrattade hon och sköt ifrån sig ynglingen, som fortsatte att kyssa och omfamna henne. — Titta, så du sotar ned mig om kinderna! Rör mig icke en gång till, odygdspåse, utan gå och tvätta dig.

Men den stora gossen skrattade endast och i det han fattade modern om huvudet gned han sina kinder mot hennes till de blevo nästan lika svarta som hans.

— Så där, ja, min lilla mor! Så! utropade han muntert. — Sedan långt tillbaka ha dina kinder varit alltför bleka. Nu har jag givit dem en smula färg. Nu är du riktigt brunhyad, och så vacker du är se'n!

Han tog hennes hand under sin arm och sida vid sida gingo de längs den lilla trädgårdsgången fram till stugan.

— Gå dit och tvätta dig, Robert, sade modern. Handfatet är i ordning. Skynda dig, ty kvällsvarden väntar.

Han tog av sig ytterkläderna och började löddra vattnet i tvättfatet och tvåla in ansiktet. Hon gick in, och efter att ha torkat bort sotet från kinderna, dukade hon bordet och gjorde i ordning maten.

— Mamma, — ropade ynglingen utifrån. — Jag har viktiga nyheter, som jag måste tala om för dig. Kom får du höra.

— Robert, — sade hon och gick till dörren, — var snäll och skynda dig och gör dig i ordning att äta. Låt nyheterna vara tills vi ätit. Maten kallnar.

— Ja, men mina nyheter äro så viktiga, att jag icke kan tåla längre. Lyssna!

Han lyfte ansiktet ur handfatet. Det var alldeles täckt av såplödder. Han började tala, men stannade nästan i samma ögonblick, gjorde en ful grimas, gnuggade sig i ögonen och hostade gång på gång.

— Brr-r-r! — stammade han. — Aj! Aj! Aj! Mamma! Hjälp! Skynda dig!

— Vad är det? — frågade modern undrande och skyndade till. — Vad har hänt, Robert?

— Tvålen! Tvålen! Den har kommit i ögonen. Aj! Aj! Hjälp.

Hon fick tag i en handduk, som hängde bredvid på väggen, fattade med ena handen tag om huvudet på den lidande och började med den andra torka tvållöddret ur hans ögon.

— Gosse! Ett sådant stort barn han är! — mumlade hon smeksamt. — Nu förstår du väl, att barn alltid böra lyda sin mor, eller hur? Sade jag icke åt dig att spara med nyheterna tills efter maten? Skynda dig nu och tvätta dig färdig. — Rodnande av skam lydde gossen och ägnade sig utan att säga något åt tvättningen.

När han om en liten stund satt vid det lilla bordet, kunde modern icke dölja den stolthet, hon kände över honom, — så vacker han var, så stark, så ädel. Lyckan strålade ur hennes ögon, när hon betraktade honom, och när hon talade till honom, var rösten full av moderskärlek.

— Har du arbetat mycket i gruvan i dag, Robert? frågade hon.

— Ja, mycket, mycket mor lilla, svarade han trött, men utan ett spår till klagan. Så jag är riktigt hungrig. Jag tror nästan jag skulle kunna äta upp en hel stekt ox.

Han började glupskt äta, under det hon pratade med honom och lade för honom. När han ibland ville omtala dagens nyheter, tystade hon honom och sade åt honom, att ej röra detta ämne förrän efter måltiden.

När han slutligen ätit sig mätt och med en suck av tillfredsställelse sköt ifrån sig tallriken, sade hon:

Låt oss nu höra nyheterna.
(Forts. i nästa n:r).



Libroj kaj gazetoj.

»Historio kaj teorio de Ido» de B. Kotzin, ĉefredaktoro de »La Ondo de Esperanto», eldonita de Librejo Esperanta, Lubjanskij proezd. 3, Moskvo, Rusujo. Prezo 50 kop. (0: 53 Sm)

La plej danĝera afero rilate al Ido estis sendube la nescio kaj de esperantistoj kaj neesperantistoj pri la esenco de la nova lingvopropono. Kiu volis ĝin koni, devis antaŭe traesplori amason da libroj, broŝuroj, gazetoj, flugfolioj k. t. p.; ĉiuj pretendante diri la veron, sed tamen ĉiuj kun la plej malsama enhavo. Estas la merito de la lerta redaktoro de »La Ondo», ke li en sia supre nomita libro kolektis multon da fideblaj informoj pri la afero, post plej profunda studo de la temo, certe postulinte longan kaj zorgan laboron.

Oni povus rimarki, ke la aŭtoro iom tro ofte parolas pri la *personoj*, sed, kiel li mem en sia antaŭparolo diras, ankoraŭ »ne venis la tempo por verki historion senpersonan kaj senpartian». Al ĉiuj, dezirante pli profunde studi la demandon, mi rekomendas la riĉenhavan volumon.

»*Aŭtunaj Floroj*», dek originalaj poemoj de dro Stanislav Schulhof. Prezo 0: 25 Sm. Universala Esperantia Librejo, 10, rue de la Bourse, Genève, Svisujo.

Malgranda, tre plaĉa kaj alloga libreto, enhavanta bukedon da originalaj esperantaj versajoj, plejparte ankaŭ je sia enhavo koncernante Esperanton aŭ ĝiajn pionirojn.

»*Intermita sciigo*» (»En meddelelse stundimellem»). Ricevebla ĉe la aŭtoro, kapitano B. J. Klingenberg, Prof. Dahls Gate 18, Kristiania.

Sub tiu titolo estas eldonata serio da artikoloj de la norvega pacifisto kapitano B. J. Klingenberg, en kiu li pritraktas la pac-ideon kaj movadon, speciale rilate al la nordaj landoj. Al ĉiu pacamiko ni varme rekomendas la verkaĵojn.

»*La Verda Kakatuo*», »unuakta groteskajo» de Arturo Schitzler, trad. de Joh. Schröder. Prezo 0: 75 Sm.

Sufiĉe originala teatraĵo, donante scenon de la granda franca revolucio, okazanta en la drinkejo de iama teatrodirektoro. »Mondformato.»

* * *

Aliaj verkoj ricevitaj:

Gvidlibro tra Graz, eldonita de Stiria Esperantista Societo. Bela, multilustrita 80-paĝa libro. Prezo 0: 20 Sm. (2 respondkuponoj). Ricevebla ĉe »Stiria Esperantista Societo», Wielandgasse 42, Graz (Aŭstrio).



ej med skodon, putsade med dålig skocreme. De hålla ej hälften så lång tid, som om ett förstklassigt putsmedel användes.

Ahlgrens Skinn- och Läderbalsam »**Nobless**» bevarar skodonen mjuka och smidiga och ge dem samtidigt den djupaste glans.

Svart, brun, gul och vit (ofärgad) i tuber à 35 öre.

Gvidfolio tra Letchworth, (Anglujo). — Letchwort estas tre interesa angla ĝardenurbo, pri kiu la malgranda, ilustrita folio donas utilajn informojn. Ricevebla ĉe s-ro F. A. Goodliffe, Elm Tree House, Letchworth Lane, Letchworth, Anglujo.

* * *

La grava sveda marafera revuo »Nautisk Tidskrift», organo de la sveda ŝipestrara societo, dediĉas en siaj lastaj numeroj grandan spacon al Esperanto, komencante serion da artikoloj, skribitaj de nia fervora Gotenbarga samideano Carl Ohlsson. La serion komencas en la aŭgusta numero bonega priskribo pri la ideo, historio kaj disvastiĝo de nia lingvo. En la septembra numero sekvas mallonga sed simpla, lerte redaktita kurso, kiu sekvas vortareto kaj ekzercaĵoj. La artikoloj honoras kaj la revuon kaj ilian aŭtoron. — La revuo estas ricevebla ĉe la ekspedicio, Stora Badhusgat. 7, 2 tr., Gotenburgo.



Korespondado.

Anonceto pri korespondado kostas nur 0,50 kr. (2 respondkuponoj).

Stuttgart (Germanujo). — S-ro Hermann Schaaf, Hospitalstr. 1, deziras korespondi kun svedaj gesamideanoj, prefere studentoj per leteroj.

HERRAR

ekipera sig bäst och fullständigast hos

Axel Lidholm

Drottninggatan 30 - - GEFLE

Josef Wikströms

Tobakshandel
GEVALIAPALATSET - GEFLE

Thermos-Flaskor 2:50

Lösa glas 1:25

hos

A.-B. Axel Karlstrand

Rikst. 12 27 GEFLE Rikst. 12 27

La Nova Testamento.

Nya Testamentet på Esperanto.

Inb. i klotband med förgyllt snitt
2: - kr. portofritt.

La Esperos red. 3-23, Gefle.

FYRVÄPPLINGEN,

organ för Excelsiorförbundet och andra folkulturella rörelser, utkommer i Skara en gång i månaden och kostar endast 1 kr. för helt år.

Mot 60 öre i femöres frimärken erhålles tidningen (utom nr 1 och 2) i utgivarekorsband från exp., adress endast **Skara**.

Aktuella programpunkter äro folkhälsans främjande och djurskydd.

Esperantoavdelning, redigerad av den kände Esperantoentusiasten direktör G. H. Backman, Hälsingborg. F. n. pågår en lättfattlig Esperantokurs för nybörjare. Litterära pristävlingar. F. n. med ett bibliotek, värt 50 kr., som pris.

Fyrväplingen är en tidning för ungdom och ungdomsvänner

Vördsamt
Redaktionen.

Kiam vi bezonas
viandon, mendu
ĉe

FRANS A. OLSON

Telef. 34 □ GEFLE □ Telef. 34

Central- och Jernvägshotellen

GEFLE

REKOMMENDERAS!

C. J. LINDH

BOK- & DISTRIBUTIONSÄFFÄR

S. FÄLTSKÄRSGATAN 19, GEFLE

Rekommenderar sig vid behov av
Böcker, Tidskrifter och Häftesarbeten.

RIKSTELEFON 16 97.

PROVU LA KOPIOKRAJONON

ESPERANTO!

3: - kr. por dekduo. 30 oeroj por unu.

W. WAHLUND, GEFLE

Wickmans Kappaffär

NORRA KUNGSGATAN 7 - GEFLE

Vid Rådhusplanaden.

Kappor o. Promenaddräkter i stort urval.
Beställningar emottagas o. utföras förstklassigt.

RIKSTELEFON 1391.

Kort Lärobok i Esperanto

för nybörjare av

ALBIN ZACHRISSON

Läroverksadjunkt, Karlstad.

Rekvireras prkontant hos förf., Karlstad.

PRIS 75 ÖRE.



N. Lundgren

GEFLE - Interurba tel. 151

Kamentuboj por fabrikoj.

Pli ol 700 konstruitaj.

Riparoj dum uzado.

Fulmkonduktiloj estas muntataj.

Propra brikejo en Upsala.

Plej granda firmo por konstruo de
fabrikaj kamentuboj en Skandinavio.

Arĝenta medalo en Stockholm 1897
, , Gefle 1901
, , Norrköping 1906

W. WAHLUND

Pappersvaror och skrivmateriel

RIKSTELEFON 17 23 ■ GEFLE

Carl Larssons

FOTOGRAFIATELIER

NYGATAN 34

Rekommenderas!

TELEFON 357

Läroböcker i Esperanto.

Kurs i Esperanto av *G. H. Backman*,
25 öre.

Lärobok i Esperanto, med Esp.-svensk
ordbok av *P. Nylén*, 1: - kr.

Erhållas hos **La Esperos redaktion**,
3-23, Gefle.



La Espero

utgives av Gefle Esperanto-
förening och utkommer i
slutet av varje månad.

Lösnummerpris 10 öre.

Prenumerationspris Kr.
1: 20.

Prenumeration kan ske
dels direkt hos tidningens
expedition, genom återför-
säljare eller på posten.

Återförsäljare önskas på
varje plats! Provision om
flere exemplar tagas!

Prenumerantsamlare er-
hålla 20 öre för varje anskaf-
fad prenumerant, om minst 5
prenumerationsavgifter in-
sändas samtidigt.

Redaktion och expedition:
3-23, Gefle.

Abonprezo ekster Svedujo
1:00 Spesmilo. (12 numeroj).

Specimeno kontraŭ re-
spondkupono. Mendo ĉe
R. Pehrsson, 3-23, Gefle.

Ozarowsky & Pehrssons Bleck- & Plåtslageri

NORRA KOPPARSLAGAREGATAN 15 - GEFLE

TELEFON 188

